**S**e iam vi venos viziti Ĥiĥonon,
**A**miko legant' nekonata,
**N**enial forgesu ekkoni personon
**T**utkore de ĉiuj amata
**I**nterne de nia ĥiĥona rondeto.
**A**ktivas li tie senlace,
**G**vidante de longe jam kursojn. Lumeto
**O**bstine brilanta kaj pace.

**M**ultegon ni ŝuldas al lia laboro,
**U**tila videble al nia agado.
**L**i krome prezidas dum vigla deĵoro
**A**sturan sekcion de nia movado.
**S**aluton al tia sinjoro!

**J**u pli li laboras, des pli li mirigas,
**U**nika li estas por iu ajn tasko.
**L**erteco simila nin ĉiuj instigas
**I**miti lin ciam (Por nia fiasko!!).
**O**bstakloj forestas en lia laboro.

**A**ktivas li ĉie efike sen peno.
**R**eale, li vivas en daŭra deĵoro,
**G**iganta vigleco, sindona sinteno,
**U**tilon donanta al nia movado.
**E**kzemplo li estas de samideano
**L**uktanta por venki, per digna strebado,
**L**a barojn survoje al paca lontano.
**E**kkriu, honore al tia agado:
**S**aluton, amiko de tre lerta mano!!

**Akrostikoj verkitaj de Alcibiades González Meana dediĉe al Santiago Mulas kaj Julio Argüelles. Iliaj nomoj, ja, legeblas vertikale, formitaj de la komencliteroj de ĉiuj verslinioj.**

Por la dumvintra foiro de nia urbo, **AEA** mendis kaj atingis standon en la urba foirejo, por propagandi pri Esperanto tie. En la stando estis esperantaj libroj, revuoj, afiŝoj, bildkartoj, k. c. Tie ankaŭ estis aĉeteblaj libroj, vortaroj… Super la stando kaj videbla de ĉiu angulo de la foirejo kaj el ekstere, flirtis la esperantista flago, kaj ĉe la lintelo, sur granda tabulo, oni povis legi en Esperanto kaj en la hispana lingvo: Esperanto, unu lingvo por ĉiuj.


E-kursanoj de Avilés

Speciale solena estis la celebrado de la esperantista festo de tiu jaro 1983 por festi la 124an datrevenon de la naskiĝtago de D-ro Zamenhof. La loko de la renkontiĝo por ĉiuj invititaj geesperantistoj el Asturio estis, kiel kutime, la strato Esperanto, kie oni metis florbukedojn apud la nomtabuloj de la strato. Poste, en la teatrsalono de la Katedro Jovellanos S-ino Rafaela Urueña prelegis pri la temo "**Esperanto: ĉu utopio aŭ socia neceso?**". Sekve, iu juna knabo, Javier Suárez Quirós, tre lerte muzik-ludis sur orgeno diversajn komposiciojn, inter ili "La Espero". Poste iu folklora koruso de la urbo kantis por la esperantistaro. Fine la festantoj bankedis en iu restoracio de nia urbo.

Januare de 1984, Santiago Mulas komencis gvidi kurson de Esperanto ankaŭ en alia astura urbo: Avilés. La klasoj okazis en la Akto-salono de la Ŝparkaso de tiu urbo. La unuan klason de tiu kurso gvidis Alcibiades González Meana, kiu priskribis ĝin tiamaniere:

…kelkajn minutojn antaŭ la difinita komenchoro, la 8a vespere,

sub la sankta signo de l' espero,
kolektiĝis multaj geaŭdantoj,
por ekkoni ion pri la afero,
kiun vartas ni, la esperantoj.